

### 1920-11-23-sergeant-fousek\_1

Kara samideano,

Grandan dankon por via ŝatinda letero kaj por viaj du interesaj P.K. Mi estas tre kontenta havi la bildon de via urbeto. Vi tre precize metis la numerojn sur ĉefaj konstruaĵoj – estas tre interese. Ĉu via domo ne estas apude? La fotografaĵo de la partoprenantoj en Hradec á kongreseto estas tre bone sukcesa. Mi ŝatas la tipon de s-ro Sklenčka. Kiu estas la virino (aŭ knabino?) tiel dika antaŭe, maldekstre kiu montras blankajn vestaĵojn sur ŝia kruro. Ĉu la s-ro sub vi dekore de vi, sur la bildo ne estas la frato de tiu kiu tenas flagegon en la mano jak bastion sur la brako, dekore sur la bildo sur la 1-a vico?

La kalkulo de la horo kiun mi skribis ne estas ofte uzata intime – nur oficiále. Tio ekzistas nur de kelkaj jaroj. Tio ekzistas ankaŭ en Belgujo. Mi metis ĝin por vi ne sciante ĉu vi uzas tion. Mi bone scias ke oni metas **Vi, Ci**, ĉar D-ro Alek. Zamenhof kiu estis slava ĉiam skribis al mi tiele. Ĉe la tuta familio Zamenhof skribis tion.

Kontraŭ tiuj kutimoj k.t.p. multe interesas min. Nekredu ke ne. Mi miras ke vi ne trovis erarojn en miaj leteroj. Ili ofte ofte ekzistas. Eble ne volaj, ne pripensitaj ĉar mi skribas tute spontane kiel mi pensas. Estas pro tio ke miaj punktoj troviĝas sur tute aliaj leteroj, mi metas ilin post la skobo de la vorto kaj mi ĉiam volas gajni tempon kaj ne atentis sufiĉe. Mi dubas ĉu mi povos korekti tion Mi provos.

### 1920-11-23-sergeant-fousek\_2

Mi neniam dovis ke la vortoj francaj „tzigane & tchéque“ simila unu al la aliaj. Mi ne komprenas kial vi diras tion. Ni certe ne konas multe pri viaj diversaj naciil sed tamen ĉiu franco edukata sicas tre bone ke ĈeskoSlovakio ne estas en Afrio kaj eĉ scias kie ĝi staras.

Kiajn personojn via amiko en Dijon konas? Certe mi ne povas lokigi ĉiujn viajn malgrandajn diversajn Landou. Ĝenerale la Franco ne scias multe pri aliaj landoj, la Angloj ankaŭ ne. Germanoj kaj vi konas multe pri ĉiuj landoj pri la geografio kaj la historio. Vi devas havi multe da tempo por okupiĝi pri politiko. Tio neniam interesis min multe. Historio kaj arton mi pli ŝatas. Estas same tie kiel ĉe vi pri diversaj politikaj partioj ekzistas pri grandaj partioj. 1. respublikanoj subtenantaj la registaron, 2. kontraŭuloj, 3. la partioj antaŭenirantoj.

Ĉiuj el ili dividiĝas en multaj diversaj partioj. La kontraŭuloj estas ĉiam Rom.katolikaj. Mia edzo estas moderata respublikano (sed tio ne signifas respublikano modere) opinie: „Gambetta, Jul Ferry, Povicare.“ Liberulo france estas „premier soldat“.

Pri la monŝanĝo mi pensas ke vi eraras. Laŭ la ĵurnalo angla mi sendas al vi la ŝanĝon de Praha kaj Austrio po **i ???** funto angla – (unu funto angla valoras 57 frankoj) do por Praha se  $57\text{£} = 285,100\text{£} = (57 \times 100) : 28 = 20$  frankoj. Por Austrio se  $57\text{£} = 1175,100\text{£} = (57 \times 100) : 1175 = 4$  frankoj. Do unu krono via valoras 0,20£.

### 1920-11-23-sergeant-fousek\_3

Do la s-ro pri kiu mi parolis al vi kiu aĉetis 800 kronojn por 200 F. antaŭ du monatoj, aĉetis kiam la krono valoris 0,25 F. Vi certe eraris kiam vi diris 100 kr.= 6,75.

Dankon grandan por la prezoj de hotelo. Do, tagmanĝo po 20 kr.=4 F. En Francujo, oni devas pagi 10 F nune por la pli ordinara tagmanĝo – la 23 an – 6-a vespere.

Mi pasigas malbonajn momentojn de post kelkaj semajnoj = mia edzo suferis tre akre je reumatismo en la dorso & nervinflamo en la iskia nervo. Terure estas vidi fortan homon subite skuatajn pro fortega doloro. La krizoj ne daŭras longe sed estas teruraj. D-ro donis morfinon al li sed tio ne kvietigis lin. Oni faras elektran kuracadon sed tio ankaŭ faris nenion. Mi ne bone dormis de tri semajnoj. Plie mia servistino forlasis min. Alia venis sed tute ne taŭgas & foriros lundon. Tiuj enuoj ŝajnas enuoj ŝajnas al vi sed por mastrumantino kun domo kiel la nia, estas enuoj kiuj malsanigas la nervojn. La krizo de servistoj estas terura en Francujo.

Estas malvarme nun ĉe ni -2° kun nord-orienta vento kiu blovas. Dum 1917 ni havis -13°-15°. Mi neniam forgesos tion. Malfeliĉaj soldatoj en traucheoj!!

Mi iris Niceon en Februaro 1917 kaj forlasis malvarmegan regionon por alveni en belan, sunan, bluan landon, kie virinoj estis blanke vestitaj kaj kie oni sidas ekstere sur la terasoj de kafejoj. Mi komencis mian ĉeeston

#### **1920-11-23-sergeant-fousek\_4**

tie kun bronkito kaŭzita de la malsimilaĵo de atmosferoj, de klimatoj. Mi restis tie 4 monatoj kaj edzo vizitis min dum militlibertempon de 7 tagoj. Malfeliĉa soldato kiu devis forlasi tiun fantazian landon por reeniri tranĉeojn!!!

Mi kusenadas artikolojn el Parizajn ĵurnalojn pri muziko. Se ili ne interesas vin, metu ilin en korbeldon. Mi ne povas multe paroli pri muziko. Oni tre tre malofte ludas bonan muzikon tie (escepte dum la sezono en la Kasino (junio – oktobro). Oni ludas „Operas“ ĉie en la teatro. Mi neniam iras ĉar mi konas ilin & la teatro estas tiel difektigita de la soldatoj angloj dum la milito (en la cinema) ĝi tute malplaĉas al mi & sole la novaj riĉuloj iras – maristoj, laboristoj ktp.

Ĉu vi ludas muzikon de „Lelande Debussij“? Mi ŝatas tion kelkfoje – „La muzike imitative“. La titoloj estas strangaj: „Le cheval dans la prairie“, „Le jardin sous le jour de pluie“. Oni kredus vidi ĉion. Nun, kara amiko, mi devas forlasi vin, de nove dankante vin por via dolĉa konatiĝo, por viaj leteroj & afableco, afablaĵoj. Amikan saluton al via edzino. Mi provos sendi P.M. al ŝi. Mi ne kolektas ilin sed mia filo jes. Ĝis la ŝatuida, baldaŭa revido.

Tutkorajn & amikajn sentojn Alice Sergeant

P. S. Ĉu vi legis ke la Ligo de Nacioj en Genevo preskaŭ elektis la hispanian lingvon kiel internacia lingvo? Ho, la ne intelektaj homoj!!! Kiel granda bedaŭro!!!

Punktojn kiuj vi povos elmeti sur kiajn literojn vi volas

Pardonu ĉiujn miajn erarojn.

#### **1920-11-23-sergeant-fousek\_5**

Li estas mia sola infano. Mi sendas fotografaĵo de li. Vi vidus kiel li estas granda. Mi trapasigos terurajn jarojn sola kun li kiu nur estis II jara en la komenco de la milito. Mia edzo estis en la milito de la 1-a – 8 – 14 ĝis 17 – 1- 19. Li estis kaporalo nur ĝis 1917 kiam li iris Londono kiel interpretisto. Ĝis

tiu momento li batalis en Francujo & Belgujo. Kiel mi bedaŭris ke mi ne povis ĉeesti viajn paroladojn & viaj kursojn la 4-an – 6-an ??? . Mi neniam legis la libron de A. Meillet – Fremduloj ofte konas pli bone nian literaturon.

Vi diras ke vi feliĉiĝas ke la sorto elektis vin ol vi mem kiel korespondanto mia – sed tre kredeble kiam vi vidos tiun longan leteron vi tute ne pensos same. Sed tiu certe estas pli longa ol aliaj ĉar ŝajnas ke mi havas tiom da aferoj por rakonti al vi. Pardonu min se mi ion tedis vin.

Vi sendube neniam estis en Boulogno. Tre grava haveno pro la fiŝkaptado. 2000 anoj preskaŭ estas fiŝkaptistoj aŭ okupiĝas pro tiu industrio. Estas du urboj: la malnova kun katedráló ĉirkaŭata de malnovaj ŝtonaj mureroj & la nova kie estas la haveno. La malnova estas konstruita sur monteto kaj ĉirkaŭata ankaŭ de arabaj promenejoj. Tie ni loĝas. Ni vidas bone la maron kvankam

### **1920-11-23-sergeant-fousek\_6**

ĝi estas malproksime, piede, je la ½ da horo. Ĉu vi ne admiras la maron? Ĝi estas amiko mia & mi suferas en aliaj urboj pro ĝia malĉeesto. Sed mi ne ŝatas ŝipvojaĝi kiam ĝi estas malkvieta. Ekz. mi revenis antaŭ du semajnoj el Anglujo & estis terure marmalsana. Oni neniam enuas apud la maro. Ĉio estas interesa – la ŝipoj ktp. kaj la artaj impresoj de koloroj estas tre fortaj precipe por tiuj kiuj estas impresemi kiel mi.

Nun, estimata sinjoro, mi ĉesas dankante vin denove pri via ĉarma letero & petante vian indulgemecon por tiu longa letero plenukata de eblaj tute neinteresaj aferoj por vi.

Estas iom malfacile la unuan fojojn kiam oni skribas ĉar oni ne konas la gustojn, la emecojn de la alia - do estu indulgema.

Tutkorajn salutojn & samideane via Alice Sergeant

Mia edzo estas doktoro ankaŭ sed ne estas la kutimo uzi sian titolon. Oni nomas lin: Maitre Sergeant